Universala Esperanto-Asocio

IJK

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko: EKO 2015-38 sendita el Wiesbaden, la 5an de aŭgusto.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

# Etoso tuja kaj ĝoja inter junuloj en IJK

Tricento da junuloj el ĉiaj mondpartoj arigis sin en la germana urbo Wiesbaden, sudokcidente de Frankfurto por la 71a Internacia Junulara Kongreso (IJK). La etoso, kiel imageble, mojosa, la ejo tre konvena kun bone ekipita koncertejo, abundaj salonoj, ses-personaj dormoĉambroj, amasloĝejoj kaj spaco por tendumi en la tereno mem.

Programo riĉa kaj partopreniga, kun horoj adaptitaj al la bezonoj de la multaj gufujemuloj. Koncertoj ĉiuvespere – i.a. Jonny M, JoMo (sur la foto sekvapaĝe), Sepa kaj Asorti, DĴ Kunar, Inicialoj DC, Ĵele, DĴ Leo. Plie kvizo laŭ la modelo 'Familiduelo', surprize altkvalita multlingva karaokeo, 3D-kinejo kun kontinua programaro, ĉio subtitolita en Esperanto, ktp. ktp.

La komitato de TEJO elektis novan estraron kun nur kvin membroj – ili do sekvis la tendencon en ILEI kies estraro sveltiĝis de 9 al 7, ĉe TEJO de 7 al 5.

- Prezidanto: Michael Boris MANDIROLA (IT), kunordigo, eksteraj rilatoj
- Vicprezidanto: Juliana EVANDRO (BR), informado.
- Kasisto: Cédric MARCHAL (BE); subvencipetado
- Ĝenerala Sekretario: Arina OSIPOVA (RU); edukado, rilatoj kun ILEI
- Estrarano: Ariadna GARCÍA GUTIERREZ (CU), landa, regiona, faka agado.

## Tritaga AMO en la fokuso

Sub la temo 'Kiel foti mojose' disvolviĝis la dekkvara seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) kadre de la IJK. Ĝi altiris inter 15 kaj 20 seminarianojn. Jen resumo:

**Tago 1:**
Malferma diskuto lunde temis pri la speco de aferoj, kiujn oni emas aŭ kutimas foti, en salonoj kaj ekstere. El la venintaj ideoj estis pretigita listo de fotaĵoj kaj seminarianoj povis voĉdoni pri ili per gluado de koloraj strioj. Videblis malprefero por statike pozantaj aŭ sidantaj homoj kun abundo da E-flagoj, kun tamen variaj esprimoj pri komunaj fotoj: tiuj ja valoras memoraĵe kaj por konservo de historio. Sed por komuniki la etoson de E-aranĝo, la preferoj iris al fotoj de homoj agantaj – dancantaj, muzikantaj, diskutantaj, kunagantaj – do dinamikaj fotoj de ĝojaj homoj kune. Tiun parton gvidis Anna Maria Koniecpolska-Lachowska kaj Sasha Murr. Post tiu elekto Anna Maria prezentis (per PREZI- prezentaĵoj) la plej kutimajn erarojn de fotantoj kaj

ankaŭ mallongan prezentadon pri rolo de perspektivo dum fotado. En tiu tago okazis ankaŭ klarigoj pri la kopirajtado de fotoj, specife laŭ la sistemo Krea Komunaĵo, kiun prezentis al partoprenantoj Magnus Henoch. La lasta sesio temis pri la kreado de filmoj kaj la novaj disvastigaj ebloj tra la komputika mondo. Tion prizorgis Chuck Smith, Judith Meyer kaj Alejandro Escobedo, kiu iĝis la nova respondeculo en TEJO pri aktivula trejnado.


**Tago 2:**
La marda sesio temis ĉefe pri la pli teknikaj aspektoj de fotado. Komence Dennis Bemmann prezentis la temon de lumigado de fotaĵoj, ĉefe modeloj, per bele ilustrita prezentaĵo. Je konsidero estas la lumkvalito – mola aŭ malmola – do difuza kaj rekte forta lumigo, la 'temperaturo' de la lumo – ruĝa aŭ blua kaj kiel influi tion, la graveco loki oportune la lumfontojn – rektajn aŭ reflektatajn kaj la uzo de daŭra aŭ fulma lumigo. Praktika ekzerco estis imagi kaj rekrei la lumigon uzitan por projekciita bildo. Unu seminariano prenis la rolon de la modelo, aliaj la pozicioj de la diversaj lumfontoj uzataj.
La dua tembloko, sub gvido de Anna Maria kaj Sasha, traktis la interagon inter rapideco de la filmo (ISO-numero) kaj de la fotado kaj la aperturo, do la grado de malfermiteco de la diafragmo kaj la diversaj rezultoj atingeblaj per bona regado de tiuj interagoj. Unu prezentaĵo (per tekniko *Prezi*) temis pri konsiloj por fari bonajn komunajn fotojn de aranĝoj.

Tiutage ĉeestis la 'patro' de AMO, Stefan MacGill, kiu salutis la seminarianojn, skizis la historion de la AMO-programo kaj la planojn por la sekvaj 18 monatoj.

**Tago 3:**
En la verkmomento, tio futuras. Temos pri merkatiko kaj fotoj, do kiel krei fotojn bezonatajn por varbaj projektoj (broŝuroj kaj flugfolioj) kaj ankaŭ por pli instiga prezento de nia komunumo aktiva kaj aganta. De Anna Maria Koniecpolska-Lachowska partoprenantoj ekkonos diversajn tipojn de reklamaj fotoj kaj kiel niaj cerboj reagas al ili. Enric Baltasar instruos pri socireteja reklamado kaj kiel ne nur kapti sed ankaŭ restigi interesiĝantojn. Łukasz Żebrowski montros unu el la eblaj utilaĵoj per kiuj oni povas kunhavi fotostokon - *flikr*. Praktika sekvo en tiu grupo povos esti kreo de reto da kapablaj fotistoj kun talento 'kapti la momenton', kies produktaĵoj estu je dispono de la redaktoroj de niaj ĉefaj revuoj.

El tio konkludeblas, ke AMO 14 daŭrigis la temojn kaj laborojn de AMO 12 en Usono. Fotado kaj filmado supozeble revenos por plia studado en estontaj seminarioj.

Vortoj: 740






Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>. Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

Se vi volas vidi aperintajn komunikojn iru al: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

EKO 38 AMO 14 kaj IJK.doc kaj pdf

PDF farita per Nuance Power PDF: 3an de novembro 2015 SMG